

Nia kvaronjarcenta esperantisteco, 5-a parto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 741, 1977.12.21 & 23 & 24

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Antaŭ ekzakte 25 jaroj mi komencis praktiki esperanton. Por iel marki tiun ĉi personan eventon mi prezentas dum kelkaj prelegoj rememorojn aŭtobiografiajn.

Ekde la infanaĝo mi mire observis, kiom facile la homoj ŝatas aparteni al limigitaj homgrupoj, identiĝi kun fermitaj pensmanieroj. Ili ŝatas religie kaj naciisme ŝovinismi. Alvenante al esperanto mi sopiris al vera mondanismo. Bedaŭrinde mi baldaŭ rimarkis, ke la plimulto de la esperantistoj rilate al la planlingvisma fenomeno restas strikte limigitaj al tio, kio okazas interne de la esperanto-movado, sekteca sinteno. Mia intereso por esperanto kontraŭe vekis ĉe mi intereson por la aliaj planlingvaj movadoj. Mi volis esti plenkonscia esperantisto, tial mi provis kompreni, kio diferencigas la zamenhofan lingvon de la ceteraj kaj la esperantistaron de la adeptaroj de konkurencaj idiomoj. Vizitante adeptojn de ido, occidental kaj interlingua mi konatiĝis kun tre interesaj kaj sindonemaj personecoj. Mi ne povis samopinii kun ili, sed mi provis kompreni ilin. El tio naskiĝis amikecoj, kiuj ludis tra gravan rolon, kiam mi provis krei en la kadro de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds arkivejon interlingvistikan.

Kun kelkaj amikoj de la ĵus mortinta Edmond Privat mi serĉis bibliotekan ŝirmejon por la dokumentaro de la fama pioniro de esperanto. Dank'al la amikeco, kiu ekzistis inter la spirita filo de Edmond kaj Yvonne Privat, Eric Descoedres, la ĉefredaktoro de la kooperativa gazeto *Coopération*, kaj Fernand Donzé, la direktoro de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, la libroj kaj arkivaĵoj de la biografo de Zamenhof trovis rifuĝejon en la koncerna biblioteko. Mi iel favoris tiun ĉi evoluon organizante ekspozicion kaj ĵurnalistan konferencon pri Edmond Privat en tiu ĉi biblioteko.

En 1965 mi diskutis kun Hans Jakob, ekssekretario de UEA kaj posedanto de grava biblioteko kaj de valoraj arkivaĵoj. Mi tiam konvinkiĝis pri la neceso starigi en la kadro mem de la biblioteko dokumentejon, kiu estu neŭtrala rilate al la interlingvistikaj skoloj, por ke ĝin povu riĉigi la pereontaj arkivaĵoj de la pioniroj de la ĝis nun konkurencaj internaciaj planlingvoj. Samtempe mi vigle konsciis, ke tiuj ĉi dokumentaroj saviĝos, nur se mi mem kontribuos al ilia protektado per persona modela laboro. Kaj mi komencis doni tiucele po unu duonan labortagon semajne. La direktoro de la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds akceptis meti je mia dispo ejon por la ordigado de la materialo kaj fakan konsilanton : bibliotekan sekretariinon.

Tre rapide tiu ĉi regula laboro montriĝis ege pozitiva, kaj mi fariĝis pli kaj pli bona konanto de la sekretoj de la ordigado de arkivaĵoj. En 1967 ni povis doni konkretan strukturon al tiu ĉi interlingvistika dokumentejo kaj tiel naskiĝis la hodiaŭ internacie konata Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo) aŭ CDELI. Kiam la posedantoj de arkivaĵoj konstatis, ke ni plenumas seriozan laboron ekster ĉia skola ŝovinismo, ili komencis sin ligi kun la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds pere de heredigaj kontraktoj. Tiel eksterordinare rapide riĉiĝis CDELI. Baldaŭ mia edzino venis min helpi por la ordigado de tiu ĉi abunda materialo, same kiel aliaj personoj, kiuj formas nun lunde matene tre agrablan kunlaborantaron. Kiam la okcidentalistoj Alphonse Matejka aliĝis al ĝi por zorgi pri la katalogado de siaj arkivaĵoj, la neŭtraleco de CDELI fariĝis okulfrapa.

Tiu ĉi formika laboro, kiun ni are plenumas nelacigeble ekde pli ol dek jaroj, estas pli kaj pli bone aprezata fare de la aŭtoritatoj de la urbo La Chaux-de-Fonds, kio faciligis la starigon en La Chaux-de-Fonds de aliaj institucioj, kiuj ankaŭ estas grandparte miaj idoj, kiel ĵus skribis Tazio Carlevaro en artikolo aperinta en la revuo *Literatura Foiro* : Tiel naskiĝis Kultura Centro Esperantista, kiu baldaŭ estos dekjara, kaj la pli junaj Gastejo Edmond Privat kaj Internacia Feria Altlernejo. Pri iliaj kreo kaj celado mi raportos venontan semajnon. En la nuna fazo de la starigo de tiuj ĉi malsimilaj, sed komplementaj institucioj, kiuj fakte formas unu grandan tuton, mi sentas antaŭ ĉio la urĝan bezonon formi viglajn grupojn de konvinkitaj kunlaborantoj, por ke la tuta entrepreno ne dependu plu de individuaj laborfortoj. Mi kredas je la kolektiva laboro, kiam ĝi estas konscie planita de kompetentaj homgrupoj, kiuj akceptas foroferi la propran fieron profite al la kultivado de komuna fiero pri la grupe plenumita laboro. Tiu ĉi spirito povas konduki al mirakloj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012